



Tagordo

Komitatkunveno de TEJO

Sabato, 4-a de marto 2023

1a sesio

10:00 - 12:00 UTC

Antaŭ malfermo: Kontrolado de ĉeestantoj			
#	Tagordero	Subtemoj	Daŭro
1	Malfermo	Bonvenigo de la komitatanoj	15 min
		Klarigo de la proceduroj	
		Elekto de propona teamo	
2	Tagordo	Fikso de cetera tagordo	15 min
3	Jarraporto	Diskuto kaj voĉdono pri la jarraporto	30 min
4	IJK 2023 & 2024	Raporto de la Kongresa Komisiono pri la venontaj IJK-oj	20 min
5	Buĝeto, financoj kaj dungoj	Diskuto pri la buĝeto kaj financoj de TEJO, informoj pri la dungoj kaj aktualaj subvencipetoj	40 min

2a sesio

14:00 - 16:00 UTC

Antaŭ malfermo: Kontrolado de ĉeestantoj			
#	Tagordero	Subtemoj	Daŭro
6	Komisionaj ĝisdatigoj	Ĝisdatigoj de la komisionoj kaj laborgrupoj de TEJO.	20 min
7	Aliĝpetoj de VMEO kaj SEJ	Depende de la stato de la aliĝpetoj de VMEO kaj SEJ, diskuto kaj voĉdono pri la aliĝpetoj	15 min
8	Diplomo pri Elstara Junulara Agado	Diskuto pri la starigo de la diplomo pri Elstara Junulara Agado kaj ĝia regularo.	20 min
9	Lingvopolitikaj Pozicioj (LPP)	Diskuto kaj eventuala akcepto de la lingvopolitikaj pozicioj de TEJO	40 min
10	Ceteraĵoj		20 min
11	Fermo		5 min



Protokolo

Komitatkunveno de TEJO

Sabato, 4-a de marto 2023

1a sesio

10:00 - 12:00 UTC

[1a sesio, vivelsendo en Jutubo](#)

Protokolas: Jeanne

1. Malfermo

a. Bonvenigo de la komitatanoj

Rogier Huurman (Roĉjo), la kunsidestro (elektita en reta voĉdono antaŭ la sesio), rapide bonvenigas la ĉeestantojn.

b. Klarigo de la proceduroj · [Komitatkunveno marto 2023 / Tagordo](#)

Roĉjo memorigas la partoprenantojn ke ni sekvos tagordon, alireblan de ĉiuj pere de Google-dokumento. Li ankaŭ klarigas la regulojn rilate al reagoj, demandoj, voĉdonado aŭ procedurajn proponojn de la voĉdonrajtaj komitatanoj.

c. Elekto de propona teamo

Roĉjo rememorigas, ke la propona teamo respondecas pri la proponoj kiuj estos voĉdonitaj. **Tobiasz**, kiel Ĝenerala Sekretario, proponas por la teamo la komitatanojn Inès Kahin kaj Michal Matúšov.

"La Komitato elektas komitatanojn Inès Kahin (A, JEFO) kaj Michal Matúšov - KuboF Hromoslav (A, VMEO) kiel membrojn de la propona teamo por ambaŭ sesioj de la komitatkunveno."

La propono estas akceptita. (22 homoj rajtas voĉdoni - 21 voĉdonas / 21 jesas).

2. Tagordo kaj fikso de cetera tagordo

Post la prezento de la tagordo, **Michael Boris** proponas aldoni erojn pri la stato de *Kontakto*, kaj pri komitatanoj A. La Ĝenerala Sekretario **Tobiasz** komentas ke la ero pri la Lingvopolitikaj Pozicioj (LPP) en dua sesio prenos mapli da tempo ol atendite, do la propono de Michael Boris ne signifas plilongigos la kunsidon.

"La Komitato amendas la tagordon aldonante eron pri *Kontakto* fine de la tagordo kaj



eron pri Komitatoj A fine de la tagordo.”

La propono de Michael Boris estas akceptita (23 homoj rajtas voĉdoni - 18 jesas / 5 sindetenas).

“La Komitato akceptas tagordon por la nuna komitatkunveno kiel prezentite”

La propono estas akceptita. (23 homoj rajtas voĉdoni - 21 voĉdonas / 21 jesas).

3. Jarraporto: diskuto kaj voĉdono · Jarraporto 2022.pptx

Tobiasz, la Ĝenerala Sekretario, enkondukas la jarraporton: li klarigas ke male al antaŭe, ĝi estas lumildaro, por ke ĝi estu pli alirebla kaj klara por komitatoj, sed ankaŭ por pli facila disvastigo kadre de eksteraj rilatoj. Li spegulis la formon de la antaŭaj jarraportoj, kiuj konsistas el du ĉefaj partoj: funkciado (Estraro, Komitato, Malferma Horo...) kaj agado (Komisionoj, Laborgrupoj...). Male ol antaŭe, kiam ĝi estis kunverkita de pluraj aktivuloj (oficistoj, volontuloj, komitatoj...), la jarraporto 2022 estas verkita nur de unu vidpunkto – tiu de la estraro – ĝi estas tiel malpli longa kaj peza (Tobiasz komentas ke li inspiriĝis de aliaj nederlandaj neregistaraj organizoj). La Ĝenerala Sekretario petas la aprobon de la Komitato, kun la eblo ke la Estraro daŭre revizu ĝin lingve kaj formate.

Michael Boris gratulas la Estraron, substrekante ke la jarraporto estas en bona kaj alirebla formo, kompare al “paĝegoj kiun [TEJO] kutimis liveri dum jaroj”. **Karina** atentigas pri la bildo reprezentante infanojn por la ero de Junaj Amikoj: ne temas pri la celgrupo de Junaj Amikoj, do ŝi petas klarigon, sed **Patricio** kaj **Tobiasz** ambaŭ konsentas tuj forigi ĝin, tiel ke la jarraporto estu voĉdonita sen la bildo. Respondante al **Manuela** kiu enketas pri Retoso, **Tyron** komentas ke li ŝatus organizi novan eventon memstare (sen E@I aŭ UEA ktp.). Li tamen ne havas konkretajn ideojn, sed planas okazigi malferman kunsidon en la estonteco.

Tobiasz petas tujan voĉdonon por ne prokrasti la decidon de la Komitato, ĉar laŭreglamente ĝi devas esti dissendita antaŭ la fino de Marto.

“La Komitato akceptas la jarraporton kiel prezentite (kun eblo daŭre fari lingvaj kaj formatajn ŝanĝojn al ĝi)”

La jarraporto estas akceptita de la Komitato (19 homoj rajtas voĉdoni - 16 jesas / 1 sindetenas + 2 maltrafas la voĉdonon pro eraraj mesaĝoj).

4. Raporto de la Kongresa Komisiono pri la venontaj IJK-oj

Enkondukas la temon la prezidanto **Albert**, kiu prezentas informojn pri IJK 2023: datoj, urbo, temo de la kongreso, servoj, programo (plaĝotago, prelegoj de la gajnintoj de KonSciu...), ekskurso al Venecio, ktp. Li kuraĝigas okazigon de sportaj programeroj (amika matĉo de flugpilkado inter IJK kaj ILEI teamoj; futbala maĉo kontraŭ loka teamo...) kaj mencias la uzon de la AKSO-sistemo, kiu



plibonigas la aliĝadon danke al pli da pagebloj, aŭ pli justa divido inter landoj. Kvankam la teamo preskaŭ plenas, li memorigas ke kontribuantoj daŭre estas serĉataj. Pri la konkurso "Partoprenu IJK-n", li informas ke TEJO ricevis 12 validajn kandidatiĝojn, sed ne eblas anonci la gajnintojn nun.

IJK 2024 estas pli tikla temo. **Albert** malkaŝas ke venis 2 validaj kandidatiĝoj (Burundo kaj Litovio) kiuj ambaŭ estas bonaj kandidatoj, do iris al la dua fazo. Pro diversaj kialoj, la Estraro ne povis preni decidon dum la lasta Estrara Kunsido (okazinta la 26-an de Februaro): Albert ne havis tampon verki la raporton, kaj venis lastminuta kontraŭpropono de la Kongresa Komisiono de UEA, kiu sugestas okazigi samtempe kaj la Universalan Kongreson kaj la Internacian Junularan Kongreson en Aruŝo, Tanzanio. Albert opinias ke konsideri ilian kandidatiĝon estus iom malrespekte ĉar ili ne oficiale kandidatiĝis (kvankam onidire, Burundo pretus subteni kaj helpi la okazigon de IJK en Tanzanio) do li petas konsilojn al la Komitato, sed la Estraro ne intencas definitive decidi ĝis la venonta EsKu.

Josuo atentigas ke Tanzanio ne respektas la rajtojn de GLAT-uloj, kaj homoj daŭre estas mortigitaj pro samseksemo, do li ne subtenas tiun proponon. **Alex** petas seriozan konsideron, ĉar ri ne emas riski sian vivon por partopreni kongreson. **Michael Boris** komentas ke oni povas konsideri la situacion ne nur kiel problemon, sed ankaŭ kiel oportunon: li volas ke homoj kiuj kreskis kun "malbonaj konvinkoj" konsci ke oni povas amikiĝi kun progresemaĵoj. Krome, li demandas ĉu oni konsideris ke ili okazu proksime en la tempo sed ne samtempe, kaj ĉu oni tamen esploris la eblon okazigi ĝin en Burundo kaj ke la homoj vojaĝu de unu kongreso al la alia. **Albert** respondas, ke li ankoraŭ ne negocis kun UEA (sed ja ŝatus ke la kongresoj ne okazu samtempe, alikaze IJK riskus esti la junularan programon de UEA) kaj ke la Estraro konsideras la burudan kongreson ĝuste pro tiu proksimeso (eblus havi busan karavanon). **Giovanni** konsilas ne organizi UK-on kaj IJK-on en la sama urbo aŭ eĉ lando ĉar li timas ke post Italio ĉi-jare, tio iĝos kutimo kaj preferus ke la du kongresoj okazu en malsamaj landoj kaj eĉ kontinentoj. **Albert** aldonas ke estante en la sama urbo, oni povus eviti "loĝistikan koŝmaron" kaj kunvidivi servojn kaj homfortojn. **Tyron** timas, ke IJK perdus sian identecon se oni okazigos ĝin samtempe kaj samloke kun UK. **Patricio** pensas, ke kongresi en alia kontinento ol Eŭropo (kio ne okazis de 2017) estus bela oportuno. Krome, multaj junuloj ignoras TEJO-n en ne-eŭropaj landoj kaj li ŝatus ke oni konsideru tion.

Albert ŝatus okazigi porinforman voĉdonon por sondi la opiniojn de la Komitato sed **Manuela** opinias ke tro fruas por decidi nun ĉar ni ne havas la respondojn pri la eŭropaj subvencioj, kaj **Karina** aldonas ke malfacilas decidi sen vidi la detalojn pri la kandidatoj. **Roĉjo** informas, ke li ne emas starigi voĉdonon. **Albert** atentigas ke okazigi retan voĉdonon prenis tro da tempo (la reglamento postulas 16 tagojn) do li klopodos informi la Komitaton per la komitata listo, kaj se komitatanoj havas sugestojn ili skribos ilin tie. **Michael Boris** tamen proponas voĉdoni nun ĉar tio malplilongigos la debatan fazon. **Tobiasz** proponas fari opinion sondon, sed petas ke Albert donu iom pli da informoj (por respekti la datumprivatecajn regulojn, li tamen sendos nur resumon).

"La Komitato taskas la Ĝeneralan Sekretarion okazigi opini-sondon pri la kongreslando



por IJK 2024, kiu finiĝu la 14-an de marto 2023. La Komitato taskas la Estraron provizi mallongan resumon pri la elektebloj.”

La propono estas akceptita (27 homoj rajtas voĉdoni - 23 voĉdonas / 16 jesas / 7 sindetenas).

5. Diskuto pri la buĝeto kaj financoj de TEJO, informoj pri la dungoj kaj aktualaj subvencipetoj · [Buĝeto 2023](#)

La kasisto **Wilson** prezentas la budĝeton por la jaro 2023 (jam aprobitan de la Komitato). Li klarigas ke li pretigis du malsamajn budĝetproponojn, unu optimisman (“bona scenaro”) kaj unu maloptimisman (“malbona scenaro”), kaze ke UEA ne kontribuas al la dungkostoj de TEJO kaj ke TEJO ne ricevas la administran subvencion (en tiu kazo, la defio estos malaltigi la deficiton).

Michael Boris havas la impreson ke la estraranoj ne tiom multe pensis pri la bona eventualo ke ni ricevos la administran subvencion: li konsilas prezenti novan version de la buĝeto al la Komitato kun tio, kio vere okazos kaze de ricevo de la subvencio (ĉu TEJO planas dungi aliajn homojn ktp.), ĉar li timas ke ni maltrafos multajn monatojn antaŭ ol efektiviĝi la bonajn rezultojn kiun ĝi povas doni. Laŭ **Tyron**, tiu propono estas sufiĉe abstrakta kaj malfacile realigebla kiam oni eĉ ne scias ĉu la nunaj dungitoj povos resti: li konfesas ke ne estas klara plano pri nova komunikisto, nova mastrumanto de volontuloj aŭ subvencipetisto sed tiuj diskutoj okazos iam somere. Resume, li opinias ke plani tion antaŭ la ricevo de la subvencio estas iom malŝparo de tempo. **Albert** konsentas kun Tyron, kaj aldonas ke li ne antaŭvidas grandan malŝparon de tempo, male al Michael Boris: nur eta prokrasto. **Patricio** samopinias kaj atentigas ke la Estraro havas aliajn prioritatojn ol pretigi novan budĝeton.

Respondante al **Ana** kiu demandas pri la stato de la kapitalo de TEJO, **Wilson** respondas ke ni havas “kelkajn milojn” en la Bunĝ-kunto de TEJO, kaj ni havas 3 aŭ 4 ŝparkontojn ĉe ING (tiel, ni povis pagi niajn ŝuldojn). **Tyron** aldonas, ke en Januaro, TEJO havis ĉirkaŭ 30 000 € de kapitalo tra pluraj kontoj, sed multe el ĝi ne estis tuŝebla (ĉar temis pri mono por IJK ktp.). Ankaŭ estis ŝuldoj por la oficistoj, sed kiam AKSO fine estos lancita, UEA devos pagi al TEJO 30 000 €. Resume, se TEJO ne ricevas la administran subvencion, la situacio estos gravega kaj komplika.

Por respondi al **Manuela** pri la gajnintoj de la konkurso “Partoprenu IJK-n”, **Albert** raportas pri la dilemo de la Estraro: ĉu elpezi nur 2000 € kaze de la nericevo de la subvencio kaj poste aljuĝi la ceterajn 3000 €, se TEJO ja ricevos la subtenon, aŭ ĉu elspezi nun 5000 €, sed riski ŝuldi monon poste. La ĝenerala emo estas elekti nur 2 aŭ 3 kandidatojn nun, kaj pretigi atendliston kaze de ricevo de la administra subvencio. Tamen estus riske, ĉar poste la vizoj povas esti mapli facile havigeblaj, kaj la vojaĝkostoj altiĝos - unu el la solvoj estus elekti unue la kandidatojn, kiuj havus pli da malfacilaĵoj eniri Eŭropon.

Respondante al demandoj pri la ricevo de subvencioj, **Karlos'** klarigas ke ni ricevos informon pri la administra subvencio fine de Marto (por subskribi la kontrakton en Majo), pri aliaj subvencioj en



Majo, kaj pri KA2-projektoj fine de Aŭgusto aŭ Septembro. Pri la administra subvencio (temus pri 125 000 €), la sistemo ŝanĝiĝis do ni povus *ne* elspezi la monon en 2023. Li aldonas ke oni devas konsideri la kvanton de mono kiun oni subvencipetis por la KA1 projektoj: la muzikalo dum IJK (38 826 €), la vojaĝkonkurso antaŭ IJK (19 940€) kaj la podkasto dum KKPS / JES (64 003€): la *plejparto* de la mono estas por manĝi, dormi kaj vojaĝi, sed eblas ŝpari monon (kiel pasintjare por la muzikalo), do tio signifas ke TEJO povus gajni monon ne nur per la administra subvencio. Same, la kosto de la salajroj foje estas parte (dutrione) kovritaj de subvencioj kie oni aldonas la laborigon. Tiu aldona mono ne estas inkluzivita en la budĝeto. Li mencias aliajn subvenciojn (kiel tiu de Konsilio de Eŭropo) kaj projektojn por kiuj TEJO povus subvencipeti venontjare: pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, pri packonstruado aŭ por retaj renkontiĝoj.

La unua sesio finiĝas je 11:58 UTC.

2a sesio	14:00 - 16:00 UTC
-----------------	-------------------

[2a sesio, vivelsendo en Jutubo](#)

Protokolas: Manu

6. Alelekto al la Propona Teamo

Ĉar en la dua sesio ne ĉeestas **Inès**, necesas elekti duan membron de la Propona Teamo. **Tobiasz** proponas ke tiu estu Michael Boris Mandirola.

"La Komitato elektas komitatanon Michael Boris Mandirola kiel membron de la propona teamo por la dua sesio de la komitatkunveno."

La propono estis akceptita (*25 homoj rajtis voĉdoni. 22 homoj voĉdonis jese, 1 sin detenis.*)

7. Komisionaj ĝisdatigoj

a. Ĝisdatigoj de la komisionoj kaj laborgrupoj de TEJO.

David komencas kun la prezento de la komisiono "Aktivula Trejnado". David informas ke en oktobro Manu komencis labori en la komisiono kiel respondeca volontulo. David ankaŭ mencias ke unu el la plej gravaj fakoj pri kio oni volas okupiĝi dum la jaro estas la ĝisdatigo de la TEJO-Akademio. Ankaŭ informas pri pluraj eventoj kaj trejnadoj, kiel la trejnado pri mastrumado de organizoj en Delft. En decembro estis organizita TTR por plani ventontaj trejnadoj kaj pretigi proponojn por subvencipetoj. David finas per informado pri ventontaj eventoj kiel la Trejnado por Novaj Trejnistoj kiu, depende de ĝia akcepto, estos organizita en Katalunio en Julio 2023. Li ankaŭ mencias aliajn antajn trejnadojn kiujn okazos kaze de akcepto de subvencipetoj. Anstataŭe de la malĉeestanta Valentin, **Jeanne** informas pri la agado de KER. Ŝi informas pri la kunlaboro inter AT kaj KER por la organizado de kelkaj eventoj. Ŝi ankaŭ komentas pri la reprezento de TEJO en pluraj spacoj kiel FoJe kaj aliaj platformoj. Ŝi fine mencias pri la ventontaj eventoj kiel EJO kiu okazos en Junio en Strasburgo. **Albert** transprenas la parolon por informi pri la komisiono pri Scienco kaj Kulturo. Albert informas pri la nunaj Komisiitoj de la komisionoj pri kiuj li respondecas. Rilate al edukado, Albert informas pri akvivaĵoj kiuj okazis dum RETOSO por junaj sciencistoj kaj



universitatanoj. Albert komentas ke ankaŭ ene de la komisiono estis lanĉitaj eventoj kiel KIAL, por paroli pri lingvoj kaj la kreado de fimojn en kiuj la homoj parolis pri fakaj temoj rilate al Scienco kaj Edukado. Pri kultura agado li diras ke estas plano por rekandidatiĝi por realigi novan muzikalon kaj ankaŭ por aliaj projektoj, ekzemple, podkastfarado. **Tyron** nun ĝisdatigas pri Informado. Nun Jeanne, volontulo en TEJO respondecas pri sociaj retoj kaj komunikado. Tyron ankaŭ priparolas venontajn planojn, kiel aldoni aliajn informojn en sociaj kanaloj. Tyron fine informas pri la situacio de YouTube kaj diras ke Manu pretas respondi pri filmmuntado. Ekparolas **Patricio** pri LFA, kiu estas tre aktiva komisiono. Li mencias kelkajn konkretajn landajn sekciojn kiel Litovio kaj laborojn pere de la Ĉilia Organizo por reaktivigi la tiean sekcion. Patricio ankaŭ informas pri eventoj okazintaj en Ameriko, Azio kaj Eŭropo. Krome, li parolas pri la reprezentantoj de la komisionoj kiuj partoprenis rete en pluraj kongresoj. Finas informante pri venontaj planoj kiel konkurso por "Elstaraj Sekcio". Patricio dankas al Tyron, MB, Valentin, Jeanne, Manu, Lenka kaj pluraj komisionoj kiuj kunlaboris kun LFA. Sekvas **Tobiasz**, kiu informas ke la laboro en la grupo de Ĝenerala Sekretario (tiel nomata Sekretaria Rondo) estas farata kune, en grupo de aktivuloj. Ĝia rolo estas ĉefe opinidona. Sekve **Nickson** informas pri Talento kaj diras ke la komisiono pri mentorado estis restarigita. La komisiono ankaŭ sendis reprezentantojn al eventoj de UEA en Tanzanio, kaj ankaŭ organizis kunsidon kun la estraroj de SEJ por informi ilin pri la agado en TEJO kaj la ebloj por ke ili iĝu landa sekcio. Li fine diras, ke li esperas ke dum la dua parto de la mandato la komisiono povos esti pli aktiva. Nickson informas ke ne estas novaĵoj rilate al la komisiono pri daŭripoveco. **Tyron** reprenas la parolon por informi pri AKSO. Li informas ke lia plano estas informi UEA pri la temo kaj informas ke la laboro progresas. **David** ankaŭ informas pri Patronoj, dirante ke la laboro estas la sama ke en la pasinteco, do kontakti la Patronoj dum naskiĝtagoj por gratuli ilin. Patricio ankaŭ informas pri Junaj Amikoj, informas ke dum pasintaj semajnoj estis kuinsido inter Mia, Jonas, Jeanne kaj li por repreni la laboron kunlabore kun UEA. **Albert** ĝisdatigas pri la rilato kun UEA kaj ILEI. Kiel observanto de TEJO en ambaŭ asocioj, li informas ke la kunlaboro bone iras. Li informas ke la planoj por venontaj monatoj estas okazigi komunan eventojn dum IJK. Rilate al la kunlaboro kun AKSO li informas ke estis pluraj kunsidoj por kunordigi la temon. Fine li komentas pri aliaj temoj kiel debato pri komuna kongreso en Tanzanio aŭ la kunordigo de la laboro kadre de IJK 2023 ke estos organizita kune kun ILEI.

Manuela demandas ĉu ni vidas la lanĉon de AKSO antaŭ la fino de 2023. **Tyron** respondas ke ne estas limdato nun, sed la plano estas ke estu lanĉita en ĉi tiu jaro.

8. Aliĝpetoj de VMEO kaj SEJ

La tagordero ne plu temas pri la aliĝpeto de VMEO, kiu estis akceptita fare de la Komitato du tagojn antaŭ la komitatkunveno. VMEO fariĝis faka sekcio kaj nomumis sian komitatanon A.

Patricio informas pri la kunsidoj okazintaj kun membroj de SEJ. Membroj de SEJ ankaŭ partoprenis en kunsidoj de LFA, kie ili informiĝis pri la progresoj de la procedo. Patricio diras ke li esperas ke dum venontaj monatoj povos esti lanĉita voĉdono por akcepti SEJ kiel Landan Sekcion de TEJO. **Espoir** aldonas ke li kunlaboris kun membroj de SEJ, kiu montris emon labori por Esperanto en Senagalo.



9. Diplomo pri Elstara Junulara Agado

Albert informas ke li ŝatus enkonduki novan premion por rekoni la laborojn, agadojn de niaj landaj sekcioj kaj junuloj. Li informas ke ekzistas simila diplomo kadre de UEA kaj komentas ke la ideo estas preni tiun ideon por rekoni la granda laboro de junaj esperantistoj. Li diras ke li ŝatus diskuti kiel ni povas realigi tion la ideon. Li mencias ke povus esti komisiono por organizi la laboron kaj ke tiu komisiono povus konsili al la estraro. Albert ankaŭ komentas ke estus interesa pripensi starigi premion por landaj sekcioj kaj projektoj, ekzemple. **Tobiasz** demandas pri la kvanto de personoj kiuj povus ricevi la premion. **Albert** respondas, ke povus esti fiksita kvanto, ekzemple 5-10. Albert fine diras, ke estos lanĉita diskuto en la komitata listo kaj ankaŭ estos malfermita alvoko por la aktivulo.

10. Lingvopolitikaj Pozicioj (LPP)

Valentin ne ĉeestas, do **Michael Boris** transprenas la rolon por informi pri la stato de la laborgrupo. MB informas ke ekzistas malneto kaj nur restas solvi la aferojn levitajn en la komentoj. Tamen ne estas plano, kio okazu nun. MB opinias ke la dokumentoj devus esti pretaj kelkajn semajnojn sntaŭ la evento EJO en Strasburgo, tial MB ŝatus ke oni fiksitu datojn por decidi kaj voĉdoni pri la dokumentoj. **Patricio** ne havas oficialan ĝidatigon pri la temo sed informas pri la bona laboro de la aktivuloj kiu laboris pri la dokumento. Li ankaŭ mencias ke laŭ li estas manko de kontinenta diverseco inter la redaktantoj de la dokumento. **MB** demandas ĉu oni preferus okazigi plian eksterordinaran komitatkunvenon en majo por voĉdoni pri la dokumento. **Tobiasz** opinias, ke tiutipa laboro prefere restu en laborgrupo, kiu prezentu la rezulton de la laboro al la Komitato. **Patricio** diras, ke li preferus havi eksterordinaran KoKu por debati la temon kaj decidi pri ĝi. **MB** prezentas voĉdoneblan proponon pri la temo. La unua propono estas fermi la dokumenton la 31-an de marto – tiam la temoj, kiam ne pretos ĝis tiam, devos esti voĉdonitaj kiel amendoj.

“La Komitato petas kunvokon de eksterordinara komitatkunvenon la 20-an de majo kun almenaŭ unu sesio plene dediĉita al traktado de LingvoPolitikaj Pozicioj. Ĉiuj aldono kiu pluaperos kiel “komento” en la plejlasta malneto sendita al la komitato, estos konsiderata kiel amendpropono.”

La propono estas malakceptita. (22 homoj rajtis voĉdoni. 9 personoj jesis, 10 personoj neis, 3 personoj sin detenis)

Estas lanĉita dua propono kun la sekva teksto:

“La Komitato petas komencon de la voĉdono pri Lingvopolitikaj pozicioj (laŭ la malneto en la jena adreso:

<https://docs.google.com/document/d/1YqX5GatpNC-ICn3Qf46ggT3LmsoJMn--e1PYUUhJVo/edit?usp=sharing>). La dokumento restu malferma por amendo ĝis la 31-a de marto. Ĉiu aldono kiu pluaperos kiel “komento” la 1-an de aprilo estos konsiderata kiel amendo. Sekve okazu voĉdonado de la amendoj kaj poste de la fina teksto kun celo kompletigi la procedon ĝis plejmalfrue la 10-a de majo.”

La propono estas akceptita (22 homoj rajtis voĉdoni. 16 personoj jesis, neniuj neis, 6 personoj sin detenis)



11. Kontakto

Michael Boris demandas pri la stato de la revuo Kontakto kaj kiu estas la situacio. **Tyron**, kiu respondecas pri ĝi, informas, ke laŭplane la venonta numero devus esti duobla. Li komentas, ke li koncias pri la problemoj de la malfruo sed informas ke unu el la problemoj venas por la diskuto trovi novan grafikiston por enpaĝigi la revuon. Oni strebos trovi novan grafikiston kaze de manko de interkonsento kun la nuna. En la estonteco estas ankaŭ plano serĉi novan redaktoron de la Movada Rubriko. **Ana Ribeiro** demandas pri la salajro por la redaktoro kaj grafikisto. **Tyron** informas, ke estas pli malpli 500 € por numero por la redaktoro kaj 200 € por numero por la grafikisto. **MB** diras ke estus interese lanĉi la proponon por nova grafikisto ekster Esperantujo. **Tyron** komentas ke li havas plurajn planojn roilate al la revuo, artikoloj, ktp. **Tyron** klarigas ke la ideo estas paroli kun la nuna grafikisto dum venontaj du semano kaj poste lanĉi alvokon ene de Esperantujo aŭ ekstere, laŭbezone.

12. Komitatanoj

Michael Boris demandas ĉu ekzistas takso pri la nombro de dormantaj landaj sekcioj aŭ aktivaj landaj sekcioj, kiuj ne sukcesas nomi komitatanon. **Tobiasz** informas ke komence de la jaro okazis rememorigo en la komitata listo pri la eblo nomumi komitatanon A.. Li diras ke danke al la kunlaboro kun LFA estis aldonitaj kelkaj komitatanoj de kelkaj landaj sekcioj dum la semajno antaŭ la komitatkunveno. **Tobiasz** petas komentojn de Patricio kaj **Tyron**. **Tyron** informas, ke la sekva KODEJO estos baldaŭ preta kaj pli-malpli 18 LS plenigis ĝin, kio jam donas iun ideon pri la numero. **Albert** prenas la parolon kaj diras malaltiĝis la aktiveco en Azio. **Albert** diras ke ankaŭ indas plifortigi la komunikadon kun kelkaj LS kiel Indonezio aŭ Filipinoj. **Patricio** konsentas pri la priskribo de la situacio kaj diras ankaŭ ke li esperas ke kelkaj eventoj helpas engaĝiĝi pli da homoj. Li fine diras ke li esperas ke baldaŭ Malagasa asocio povos rekomenci sian labori kaj povos esti unu plia landa sekcio en TEJO. **Patricio** ankaŭ komentas pri KODEJO kaj dankas Arya pro lia laboro. Nun la laboro estas revizii la dokumenton kaj la ideo estas repreni tiun laboron dum venontaj monatoj.

13. Ceteraĵoj

a. RETOSO

Tyron informas ke estas plano por reorganizi RETOSO denove. Li taksas la kunlaboron kun UEA sukcesa, sed li opinias ke RETOSO devus havi pli fortan, propran identecon. **Tyron** ankaŭ diras ke li ŝatus ke okazigu pli ol unufoje jare kaj li esperas ke povus okazi antaŭ IJK, ekzemple en majo. Li diras ke li ŝatus okazigi RETOSO memstare kaj senpage por ĉiuj membroj de la organizo. Li proponis kelkajn platformojn kiujn oni povu uzi por la okazigo de la evento. **Tyron** finas pri la mencio ke lia ideo estas ke dum venontaj semajno okazu konkreta kunsido pri RETOSO.

Manuela rimarkas ke por retaj eventoj kelkfoje ne estas multaj partoprenantoj kaj ŝi ne certas ĉu homoj estas interesitaj pri retaj eventoj. **Tyron** opinias ke jes, sed oni devas pli malfermi la eventon kaj tiel eble pli da junuloj partoprenu.

MB opinias ke RETOSO estas interesa propono por junuloj kiuj ne povas partopreni en ĉeestaj



eventoj. Pri la malfermeco de la evento MB opinias ke la afero havas plurajn flankojn, kaj komentas ke eble estus interese konsideri plurajn eblojn por doni kiel avantaĝon al membroj de TEJO. Tyron komentas ke malferma eventoj simpligas la organizadon kaj partopreno en la evento. **Albert** diras ke li ne havas neniun dubon pri la eblo daŭrigi kun la eventoj dum venontaj jaroj ĉar estas interesa maniero por tutmondigi la asocion. Li ankaŭ dubas pri la malfermeco de la evento. Li opinias ke oni povus eksperimenti kaj fari malferman eventon kaj vidi kiel tiu aspektas. **Tyron** skribas en la babilejo "Mi ĝenerale opinias ke engaĝiĝeco multe pli gravas ol la kvanto de membroj mem. Kaj konsidere ke (malkiel UEA) niaj financoj ne dependas de membrokotizoj, ni povas esti pli liberaj". **Patricio** aliĝas al la duboj pri la malfermiteco de RETOSO al ĉiuj partoprenantoj. **Ana** demandas ĉu KIAL estis pli sukcesa ol RETOSO. **Albert** diras ke ne eblas kompari ilin ĉar la grandeco mem ne povas esti komparita. Li diras ankaŭ, ke ne estis multa tempo por varbi pri KIAL, sed li taksas ke la evento estis pli sukcesa ol oni atendis. Li diras ke la averaĝa kavanto de homoj dum KIAL estas 8 homoj. Poste, **Patricio** prezentas la malferma evento pri afrikaj lingvoj ke estis ege pli sukcesa laŭ la tempo en kiu estis organizita sed ankaŭ diras ke estis multaj maljunuloj kiuj partoprenis. **Ana** proponas okazigi du retajn eventojn, unu malfermitan kaj unu ĉefe por la membroj, por kompari la sukceson..

b. Varbado

Patricio anoncas, ke LFA planas okazigi plian KJK dum venontaj monatoj.

Francesco rememorigas ke IJF okazos en Kalbrijo de la 5-a ĝis la 11-a de Aprilo kaj ke ĉiuj estas invititaj.

Roĉjo memorigas ke la venonta komitatkunveno okazos dum IJK en Italio. Li dankas kaj ĝisas la partoprenantojn.

La dua sesio finiĝas je 15:59 UTC.